La libro „Sciencaj studoj" estos tre utila por propagando inter scienciston, ĉar ĝi klare montros al ĉiu ke esperanto jam kapablas por verkado en ĉiuj sciencaj branĉoj. Tiu fakto multe pli utilos ol plej bona pervorta propagando. Pro tio utiligu ĝin fervore.

La titolo „Sciencaj studoj" estas provizora kaj ĝi restos nur se ni ne trovos pli konvenan titolon. Se vi trovos pli bonan titolon bonvolu proponi ĝin al la redaktoro d-ro Neergaard (Gothersgade 158, Kopenhago) aŭ al kiu ajn estrarano de ISAE.

La libro certe aperos, ĉar jam dum la kongreso kaj tuj post la kongreso alvenis ĉ. 150 antaŭmendoj. Tuj mendu: ja profitu la rabatitan antaŭmendan prezon de 18 danaj kronoj. Krome la eldonkvanto dependos de la nombroj de antaŭmendantoj kaj pli granda eldonkvanto estos nepre pli granda sukceso!

La antaŭmendojn kaj la monon oni sendu al la dana delegito V. Jørgensen, Martinus Rasmussensgade 21, Nyborg, poŝtkonto 21512.

B. Popoviĉ.

655.4/.5 : 001(02/09) = 089.2

LA FONDAĴO „SCIENCO"

Koncerne la fakan literaturon Esperanto-movado troviĝas en la evoluperiodo kiu postulas aperigon de la artikoloj, libroj, fakterminaroj, ktp. kiuj ne havos multajn legantojn kaj eĉ malpli da aĉetantoj. Speciale la fakterminarojn oni povas eldoni en nur malgranda kvanto, ĉar la lingvo rapide evoluas sciencflanke kaj la terminaroj rapide malnoviĝos. Krome la eldonistoj ankoraŭ ne ŝatas transpreni la riskon por eldoni fakan esperantan libron, pro kio ni bezonas propran bazan kapitalon. De kie ni havigu ĝin? Kompreneble en la nuna situacio precipe de esperantista popolo.

Jen kial la estraro de ISAE decidis krei la fondaĵon „Scienco" kaj la jarkunveno en Kopenhago akceptis ĝian regularon:

1. La fondaĵo „Scienco" estas kreita kiel helporgano de ISAE por la celoj de la paragrafo 2 kaj ne povas esti utiligata por aliaj celoj.
2. La celoj de la fondaĵo estas:
   a. subvencii eldonadon de fakaj nepolitikaj libroj kaj terminaroj,
   b. helpi aperigadon de esperantaj fakrevuoj.
3. La elspezoj el la fondaĵo povas esti farataj nur post la decido de la ISAE-estraro. Nur en urĝaj okazoj oni povas fari la elspezojn ĝis 100 steloj post interkonsento de du estraranoj, kondiĉe ke la estraro tion poste aprobu.

Esperantistoj estas kutime neriĉaj, ofte eĉ malriĉaj homoj. Sed brikon post briko oni faras la domon. Krome tamen inter ni troviĝas ankaŭ finance bonstataj homoj, kiuj komprenos ke penetro de Esperanto en diversajn sciencajn branĉojn estas en la nuna momento la plej grava tasko de nia movado. Kaj tiu penetro estos tro malrapida sen la financa bazo. Kontraŭuloj utiligas tion kaj provas subfosi entute la ideon de internacia lingvo financante Interlingua-n. Ni scias ke ili ne povas malebligi la historian evoluon kaj haltigi la progreson de Esperanto, kiu estas la sola esence internacia lingvo. Sed ni scias ankaŭ ke ili povas fari malfacilaĵon, malrapidigi la evoluon, se ni ne havos propran financan bazon. Kaj pro tio ni kreas ĝin kaj ni konstante plifortigados ĝin. Ĉiu helpo en tiu direkto, eĉ tre malgranda, estos kun danko akceptota.

La monon por la fondaĵo sendu provizore nur al s-ro *S. Alexandersson,* Ulricehamnsvägen 16 n.b. JOHANNESHOV, Svedujo, *poŝtĝiro 190976.* La delegitoj estas petataj kolekti la donacojn.

Ĝen. sekretario B. Popoviĉ.

061.22 (ISAE),,1906/1956".053.7,,1956.08.07"(489)

JUBILEA KUNVENO DE I.S.A.E.

(Laŭ *„Esperanto",* septembro, 1956).

Internacia Scienca Asocio Esperantista okazigis mardon matene en la salono Zamenhof specialan aranĝon por festi la 50-jaran jubileon de sia ekzisto.

Unue la trio *Esther Vagning* (piano), *Erik Thomson* (fluto) kaj *Mogens Steen Andreassen* (hobojo) kun multe da arta gusto ludis la sonaton de Johann Quantz. Poste *Poul Thorsen* deklamis sian Prologon, kiun ni aperigas en tiu ĉi numero de la revuo. La Vicprezidanto de I.S.A.E., Muzea Kuratoro *C. Støp-Bowitz* bonvenigis la multnombrajn ĉeestantojn kaj akcentis, ke la scienco, same kiel la muziko, estas universala kaj tial ĝi bezonas komunan lingvon. Li informis, ke I.S.A.E. eldonos, okaze de sia jubileo, verkon de ĉ. 250 grandformataj paĝoj. Ĝia provizora titolo estas „Sciencaj Studoj", kaj en ĝi promesis kunlabori per originalaj kontribuaĵoj multaj sciencistoj-esperantistoj.

D-ro Paul Neergaard, la ĉefa organizinto de la festo, prezentis la evoluon de I.S.A.E., kiu estis fondita dum la Dua Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo. Inter la fondintoj estis la fama franca specialisto pri balistiko, generalo Sébert. Internacia Scienca Revuo, kiu poste fariĝis organo de la Asocio, komencis aperadi jam du jarojn antaŭ la fondiĝo de I.S.A.E., nome en 1904. Multaj sciencistoj publikigis en ĝi diversajn traktaĵojn, el kiuj unu el la plej gravaj estis tiu de la fama svisa entomologo kaj seksbiologo August Forel.

Inter la dek sciencistoj, kiuj ĝis nun estis prezidantoj de I.S.A.E., troviĝas la nomo de Nobel-Premiito: D-ro J. J. Thomson, profesoro pri fiziko en la Universitato de Cambridge, kaj de prezidinto de la Franca Akademio de Sciencoj D-ro Cotton, profesoro pri fiziko en la Pariza Sorbonne. Post la Dua Mondmilito, dank' al la larĝvida nederlanda eldonejo Muusses, la organo de I.S.A.E. denove regule aperas kun enhavo ĝenerale tre altnivela, tiel ke ĉiu klera homo povas ĝin legi kun intelekta profito. La esperantistoj, kiuj komprenas la gravecon de komuna lingvo por la scienco, devus multe pli forte apogi I.S.A.E. per aliĝoj kaj abonoj al ĝia organo.

D-ro Neergaard menciis ankaŭ la gravajn studojn rilate normigon, kiujn faris precipe la fama aŭstra esperantologo Eugen Wüster kaj la rusa terminologo Ernest Drezen. En la lasta tempo D-ro Holmstrom de UNESKO sugestis proponon pri Esperanto kiel pontolingvo por fakaj terminaroj.

En la kadro de la festo Prof. D-ro W. E. Collinson, emerita profesoro de la Universitato de Liverpool, faris prelegon sub la titolo „Lingvoj en Kontakto — La Teorio de Pruntvortoj kaj de Lingvomiksado". La tre interesa kaj grava prelego de la fama brita lingvisto signifas novan kontribuon al pli bona kompreno de miksiĝoj kaj kunfandiĝoj en la evoluo de la lingvoj.

Post mallonga paŭzo Prof. D-ro Ivo Lapenna faris mallongan konkludan paroladon pri la „Perspektivoj por la Apliko de Esperanto en la Scienco". Li difinis la sciencan laboron kiel intelektan aktivecon, kiu celas ekkoni aŭ larĝigi la konojn pri la leĝoj regantaj la naturon kaj la homan socion. Tial la scienco dividiĝas je du grandaj brancoj: naturaj sciencoj kaj sociaj sciencoj. Aliflanke ne estas scienco la lernado de la jam ekkonitaj leĝoj, nek ilia aplikado en la praktiko aŭ transdonado al la aliaj. Personoj, kiuj okupiĝas pri tio, povas esti tre grandaj fakuloj kaj ilia laboro estas sendube tre utila, sed ili ne povas esti konsiderataj kiel sciencistoj. En I.S.A.E. troviĝas kaj povas esti ĝiaj membroj ĉiuj, kiuj havas ian ajn rilaton al la scienco, do ne nur sciencistoj, sed ankaŭ diversspecaj fakuloj. La plua utiligo de Esperanto por la scienco dependas ne nur de la preteco de sciencistoj verkadi en la lingvo, sed ankaŭ de la kapablo de la esperantista publiko havigi al si iliajn verkojn. Kun la konstanta pligrandiĝo de la nombro de personoj sciantaj la Internacian Lingvon, samtempe pligrandiĝas la eblecoj por apliko de Esperanto en la scienco. Tio ankaŭ malfermas ĉiam pli la paĝojn de nacilingvaj sciencaj revuoj por studoj kaj artikoloj, verkitaj en Esperanto. Prof. Lapenna en la fino forte rekomendis al la esperantistoj subteni I.S.A.E. kaj ankaŭ mendi la verkon Sciencaj Studoj.

Per ludado de la Divertismento de la Dana komponisto D. F. Kuhlau finiĝis tiu ĉi jubilea festo, laŭ la karaktero kaj agordo digna de I.S.A.E. kaj de la Internacia Lingvo. — I. Lapenna.

PROLOGO

50-jara Jubileo de Internacia Scienca Asocio Esperantista
Kopenhago 7-8-1956

Pasis duona jarcento decida —
Staras scienco kaj lingvo planita
ambaŭ ĉe grava instanco:
Ĉu ruiniĝo aŭ renesanco?
  Antaŭ defio
  vokas racio
ambaŭ nun por alianco.

Luktis scienco en ĉiu epoko
kontraŭ ignoro, malhelpo kaj moko.
Sed **Galileo** kaj **Fulton**
pruvis, ke eblas privenki la stulton.
  Al pioniroj
  ofte martiroj,
sentu hodiaŭ la ŝuldon.

Preter progresoj kvalitaj kaj kvantaj
pasis scienco per paŝoj gigantaj.
Kreskis la sano kaj aĝo,
krevis la nuboj de kriza domaĝo.
  Kun konsekvenco
  gvidas scienco
voje al sato kaj saĝo.

Ritmo distingas sin ĝis la kresĉendo
tra la perturboj de l'nuna jarcento:
Beno kaj bruo teknika,
vivo facila — sed esto komplika.
  La teorio
  per energio
iĝas realo unika.

Homo racia facile konkludas:
Ĝuste nun lingva problemo akutas!
Tamen al indiferento,
rido, rutino ĝis nuna momento
  lukti necesas,
  ĝis ni sukcesas
veli science en vento.

Lingvo tutmonda ekestis pro revo —
Ne nur militoj minacis per krevo.
Premis nin longe kateno:
La izoleco, sed venkis la peno
  antaŭ UNESKO.
  Venas nun kresko
en pli sekura haveno.

Ĉar Esperanto, helpilo teknika,
montris por arto sin plene efika.
Floris ĝi en la izolo,
fajnas nun kiel matura grapolo.
  Tempo obskura
  tenis ĝin pura
sub humanisma kontrolo.

Tia kontrolo estas esenca
lingve, sed eĉ pli al vero scienca:
Vero neniam por vendo.
— Sorĉo-disĉiploj de l' nuna momento!
  Fortojn vi veku,
  sed ankaŭ regu
glore al inteligento!

Poul Thorsen

061.22 I.S.A.E.

ISAE-INFORMOJ

Al la usonaj membroj. Ĉar la delegito de ISAE por Usono, d-ro F. J. Belinfante, ne plu havas tempon por la taskoj de delegito, ni alvokas vin pri kunhelpo. Bonvolu skribi al ISAE se vi volas transpreni la oficon de delegito de ISAE. — S. Alexandersson.